



Estrara Komunikado EKO 2017-30 sendita el Budapeŝto, la 5an de novembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkröĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

Nova servo por ILEI-membroj

Bonega kunlaboro regas inter nia instruista ligo kaj www.edukado.net kaj tiu kunlaboro plu kreskas. Grava aspekto de tiu kunlaboro : la registrado de ĉiuj kursoj en la mondo okazas ĉe edukado.net. Nek ILEI nek UEA volas eluzi limigitajn homfortojn por fari la saman kolekton ĉe sia flanko. Do la listo ĉe edukado.net estas la oficiala registrejo. La retejo www.edukado.net proponas tiun eblon elekti parton de tiu listo, vidigi kursojn laŭ niveloj ktp. La retejo de ILEI www.ilei.info ne proponas tian eblon.

Delonge validas la sekvo: se vi registras vian kurson ĉe edukado.net, vi ricevos liberan aliron al aro da ekzercoj, pli ol 800 eroj, do giganta kolekto de instrumaterialo. La dekstra bildo montras la mapan prezenton de kursoj. Sama aliro estas, se vi liveras ekzercojn, kiujn vi mem verkis. Dua aspekto de la kunlaboro inter ILEI kaj edukado.net: ILEI-membroj ekde la unua de januaro 2018 havos liberan aliron al tiu instrumaterialo de edukado.net, tiun servon de la fama paĝaro. La ILEI-membroj, kiuj deziras uzi tiun servon, devas anonci tion al sia sekciestro kun indikoj jenaj :

Familia nomo
 Individua nomo
 Salutnomo ĉe edukado.net
 Urbo, Lando

Se en via regiono ne estas ILEI-sekcio, bonvole turnu vin rekte al Katalin Kovats kaj Mireille Grosjean. (katalin.kovats@ilei.info; mirejo.mireille@ilei.info). ILEI tre dankas al d-ino Katalin Kovats, kiu ebligas tiun liberan uzon. ILEI-membroj uzu tiun eblon kaj instru Esperanton per tiuj iloj! Por membriĝi vin en ILEI Iru al www.ilei.info. ILEI volonte akceptas iun ajn, kiu rekonas la gravecon de edukado kaj instruado; ne nepre necesas, ke vi estu profesia aŭ emerita instruisto. Same bonvenas kursgvidantoj kaj subtenantoj de la instrua programo de ILEI.



Afrika muziko prezentita en la kontinenta bulteno

Esperanto-muziko en Afriko konas sekvon de favoraj ekfloriĝoj kaj tio okazas danke al tiuj afrikaj muzikistoj kaj aliaj Esperanto-agantoj, kiuj laboras konstante por plena enhejmiĝo de la Esperanto-kulturo kaj la evoluigo de la movado en la kontinento.

Jen la 32-a numero de la afrika bulteno *Esperanto en Afriko*, kies PDF formato eblas elŝuti per:

<http://www.esperanto-afriko.org/Esperanto%20en%20Afriko%20%20n-ro%2032.pdf>,

Vi konatiĝos i.a. kun la nova talento de la afrikaj muzikistoj, kiu lasttempe produktis sian unuan albumon en profesia son-kvalito kun koruso. Tiu DVD estas mendebla tra la Libroservo de UEA kontraŭ €9.90



Legeblas krome pri io tre bela far honora membro de la konga landa asocio DKEA, kiu partoprenis en neesperantista forumo en la ĉefurbo Kinŝaso kaj rekte invitis pli ol 2000 kongajn kuracistojn kaj sciencistojn lerni kaj uzi Esperanton. Tiu ĉi bulteno enhavas ankaŭ detalojn pri instruaj agadoj en kelkaj unuopaj landoj kaj freŝdataj okazintaĵoj, komunikon pri la oficejoj de UEA en la kontinento kaj multajn aliajn legindaĵojn. Bonan legadon!

Adjé Adjévi

Loka agado en grava loko

La Internaciaj Letertagoj "Vorto pri Samarkando", dediĉitaj al Tago de la Urbo, bone sukcesis. Venis multegaj leteroj kaj aliaj materialoj el plej diversaj partoj de la terglobo. Multaj reeĥoj estis publikigitaj en nialandaj retaj kaj paperaj periodaĵoj. Vidu la alkroĉitajn dosierojn kaj ĉi-subajn retligilojn:

6<http://sv.zarnews.uz/kultura/5308-slovo-o-samarkande-zvuchit-so-vseh-kontinentov.html>
<http://sv.zarnews.uz/kultura/5325-slovo-o-samarkande-zvuchit-so-vseh-kontinentov.html>
<http://sv.zarnews.uz/kultura/5344-slovo-o-samarkande-zvuchit-so-vseh-kontinentov.html>
http://kultura.uz/view_2_r_10232.html
http://kultura.uz/view_2_r_10237.html
<http://www.gazeta-lady.uz/obo-vsem-na-svete/avtograf-mira/planeta-pozdravlyat-samarkand.html>
<http://ru.sputniknews-uz.com/culture/20171018/6585909/samarkand-pochta-pisma.html>
<http://www.podrobno.uz/cat/calche/samarkandu-2750-let-so-vsego-mira-v-gorod-prikhodyat-pozdravitelnye-poslaniya/>
<http://sv.zarnews.uz/kultura/5359-na-yazyke-esperanto.html>

"Samarkandskij Vestnik" ("Heroldo de Samarkando") estas niaregiona ĵurnalo. La semajna familia gazeto "Lady" estas legata en diversaj partoj de nia lando. Laŭbezzone, por kompreni la enhavon, vi povas facile Esperantigi aŭ nacilingvigi la tekstojn, uzante [Translate.Google.com](https://www.google.com/translate) aŭ similajn retajn tradukilojn. Ni dankas ĉiujn, kiuj kontribuis al la projekto kaj ni esperas foje bonvenigi vin en la 2750-jara Samarkando, "Romo de l'Oriento".

Anatoli Ionesov, Enciklopedia projekto "Samarkandiana"
P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando, Uzbekio, imps86@yahoo.com

Sumoo antaŭ la duoncento

La partoprenantoj legas librojn, ĉiun tagon, pli ol mem promesitan kvanton da paĝoj, kun 350 homoj en la mondo. Ekde la 12a de novembro komenciĝos la 49a Internacia Esperanto-Sumoo ĝis la 26a de novembro. (15 tagoj). Mi atendas vian aliĝon. Donu jenajn informojn: Via nomo, sekso, luktista nomo (pseŭdonimo), urbo, lando, retadreso, titolo de legota libro kaj kvanto da paĝoj por unu tago.

Por pli da informoj vizitu niajn retejon, Vikipedian kaj Fejsbukan paĝojn:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>, https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko: <https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

HORI Jasuo (s-ro), 371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3; horizonto@water.sannet.ne.jp

Eksteraj eĥoj de la 4a SAS

En la lasta tago de la SudAzia Seminario (SAS 4) raportita detale en EKO 28 (FLAM-analizo) kaj 29 (Laborplano por FEB), venis ĵurnalisto por intervui kelkajn homojn. Tiu venis el la Ĵurnalo *The Hindu*, kiu estas eldonita tra la tuta landego en 18 lokoj tra naŭ gubernioj. Ĝi estas la dua plej legata anglalingva ĵurnalo en la tuta Barato, kiu aperas en presita formo en meze 1,45 milionoj da ekzempleroj. La reta versio de la artikolo estas potenciale alirebla de milionoj da pliaj legantoj.

Jen raporto pri Esperanto, SAS-4 kaj la vizito de Stefan MacGill en la bengalura eldono de tiu grava ĵurnalo *The Hindu*.

The magic of a constructed language

La magio de konstruita lingvo

Nikhil Varma

<http://www.thehindu.com/todays-paper/tp-features/tp-metroplus/the-magic-of-a-constructed-language/article19959293.ece>

La foto kape de la artikolo fakte ne ekestis en la 4a SAS, sed estis farita dum la vizito de la vicprezidanto de UEA al la universitato Azim Prenji unu semajnon pli frue. Evidente (kiel kutimas), ne ĉio dirita precize samas kiel tio skribita, sed la intervjuisto estis scivolema, bonvolema kaj klare sen antaŭjuĝoj. La tono de la artikolo estas resume pozitiva. Ĝi aŭguras la eblojn utile konigi niajn mesaĝojn!



Iniciato
Nepala.
Mem broj de
la 4a SAS
pozas en To-
ĉemizoj kun
broditaj
steloj, kiujn
la nepalanoj
alportis.

Vortoj: 855

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.